

Vendredo, 10-a januaro

13:00 – 18 :00 Registrado

18:00 – 19 :30 Komuna vespermanĝo

19:30 – 22 :00 **Neformala babilado**

Sabato, 11-a januaro

07:00 – 08:30 Matenmanĝo

09:00 – 10:00 **Malferma ceremonio** (*Estraroj*)

10:00 – 10:30 Kafopaŭzo

10:30 – 12:00 **Esperanto-kursoj:**

Komencantoj (*Cecily Lee*)

Progresintoj (*Stefan MacGill*)

Tiu kurso por progresantoj havas la celon reviziti la bazajn regulojn de Esperanto, paroligante la ĉeestantojn.

Spertuloj – Prelegserio de Duncan Charters:

*** Kiel poliglotoj lernas lingvojn?**

Poliglotoj, aŭ multlingvuloj, antaŭnelonge komencis organizi konferencojn, renkontiĝojn kaj trejnsesiojn por komuniki la plej sukcesajn manierojn akiri aliajn lingvojn. Kion ni povas lerni de ili por faciligi nian pli rapidan alproprigon de Esperanto kaj de aliaj lingvoj?

12:00 – 12:30 **Kongresa Foto-1**

12:30 – 13:30 Tagmanĝo

14:00 – 15:00 **Vivo de “Germanaj Specialistoj” en Sovet-Unio en la jaroj 1946 ĝis 1958** (*Emma Breuninger*)

Post la dua mondmilito, ĉiuj 4 venkintaj potencoj (Usono, Britio, Francio kaj Sovetunio) tre interesiĝis pri la scio de germanaj sciencistoj.

En la frua mateno de la 22a de oktobro 1946 pluraj mil sciencistoj (inĝenieroj, teknikistoj, fizikistoj, kemiistoj, ktp.) en la Sovetia Okupata Zono (posta GDR) kaj Orienta Berlino estis vekigitaj pere de sovetaj soldatoj, kiuj legis al ili dekretan de Stalino, laŭ kiu ili estis devigitaj al 5 jaroj da laboro en Sovet-Unio. Kelkajn horojn poste ili jam estis en la trajno. La familianoj devis akompani ilin. De 5 jaroj fariĝis pli ol 11 jaroj. La lastaj “specialistoj” ne povis reveni hejmen ĝis 1958.

Unu el ĉi tiuj familioj estas tiu de Emma Breuninger. Ŝi mem naskiĝis dum tiu tempo en Moskvo.

15:30 – 16:00 Kafopaŭzo

16:00 – 17:00 **La historio de oro** (*Sandor Horvath*)

17:00 – 18:00 **Tokipono: Fulmokurso al la lingva simpleco** (*Marie Elliot*)

La PIV vortaro de Esperanto enhavas ĉirkaŭ 15,000 radikvortojn, kaj tio kreskas. Dume, Tokipono estas lingvo fiksita je 120 vortoj. Kiel eĉ funkcias tiel eta lingvo? Kiom oni povas esprimi, kaj kiel ĝi povas helpi al esperantistoj? Venu por lerni iom da la lingvo, kaj eltrovi la respondojn!

18:00 – 19:30 Komuna vespermanĝo

19:30 – 21:30 **Novzelanda Vespero**

Dalmatinska Tamburica Grupo (*Ivan Pivac*)

Dimanĉo, 12-a januaro

07:00 – 08:30 Matenmanĝo

09:00 – 10:30 **Esperanto-kursoj:**

Komencantoj (*Cecily Lee*)

Progresintoj (*Stefan MacGill*)

Spertuloj – Prelegserio de Duncan Charters:

*** La kataluna kontribuo al la Esperanto-movado**

- 10:30 – 11:00 Kafopaŭzo
- 11:00 – 12:30 **Esperanto-kursoj:**
Komencantoj (*Cecily Lee*)
Progresintoj (*Stefan MacGill*)
Spertuloj – Prelegserio de Duncan Charters: * **Viaj kontribuoj**
- 12:30 – 13:30 Tagmanĝo
- 14:00 – 14:45 **Tezaŭro de Puzzle Foundry** (*Donald Rogers*)
PuzzleFoundry.com estas unika retejo kie oni povas krei kaj publikigi krucvortenigmojn. Ĝi estas plurlingva retejo, aktuale en kvin lingvoj, inkluzive Esperanton. Ĉiun lingvon subtenas vortaro/tezaŭro, per kiu oni povas serĉi vortojn por elekti taŭgan vorton por la spacetoj en vortenigmo.
La tezaŭroj kaj la eblecoj por serĉi la tezaŭrojn estas planitaj por interesi ne nur enigmofarantojn, sed ankaŭ lingvistojn. La sistemo disponigas diversajn metodojn por serĉi la tezaŭron. Ekzemple, la serĉprogramo povas grupigi rilatajn vortojn al donita vorto por montri logikajn subtemojn inter la rilataj vortoj.
- 14:45 – 15:30 **Gramatikaj interesaĵoj** (*David Ryan*)
Sesio pri gramatikaj demandoj, esprimoj, kaj eraroj
- 15:30 – 16:00 Kafopaŭzo
- 16:00 – 17:00 **AEA – Jarkunveno.** Eblas ankaŭ partopreni skajpe
- 17:00 – 17:30 **La forgesita impresionisto: la aŭstralia John Russell** (*Jonathan Cooper*)
- 18:00 – 19:30 Vespermanĝo
- 19:30 – 20:30 **Landa agado de Universala Esperanto-Asocio (UEA)** (*Stefan MacGill*)
- 20:30 – 21:30 Ludvespero

Lundo, 13-a januaro

- 07:00 – 08:30 Matenmanĝo
- 09:00 – 10:30 **Esperanto-kursoj:**
Komencantoj (*Cecily Lee*)
Progresintoj (*Stefan MacGill*)
Spertuloj – Prelegserio de Duncan Charters:
Interkultura kompreniĝo
Kiu estas la ĝenerale agnoskitaj faktoroj ebligantaj interkulturan kompreniĝon? Ĉu tio okazas nature per la uzado de Esperanto, aŭ ĉu necesas pli konscii pri la influo de ne nur lingvaj, sed ankaŭ diversaj kulturaj faktoroj por nia komunikado kun aliaj homoj?
- 10:30 – 11:00 Kafopaŭzo
- 11:00 – 12:30 **Esperanto-kursoj:**
Komencantoj (*Cecily Lee*)
Progresintoj (*Stefan MacGill*)
Spertuloj – Prelegserio de Duncan Charters: * **Viaj kontribuoj**
- 12:30 – 13:30 Tagmanĝo
- 13:30 – 14:30 **Katedraloj de la mondo** (*David Ryan*)
Prelego pri la historio kaj graveco de katedraloj tra la mondo kun multaj fotoj.
- 13:30 – 15:30 **Arboplantado** (*Mara Molnja*)
Ni enpotigos delandajn plantojn kun Ecomatters, loka karitata organizaĵo, kaj lernos pri la plantospecoj en Novzelando. Niaj plantoj poste engrundiĝos ĉe diversaj riverbordoj. Venu por planti, amikumi kaj samtempe helpi al la loka naturo! Maksimume 20 homoj.
- 15:30 – 16:00 Kafopaŭzo
- 16:00 – 17:00 **Historio de la radiostacio 3ZZZ en Melburno** (*Franciska Toubale*)

Mi deziras konatigi al vi la historion de la radio 3ZZZ ne nur por ke vi pli bone komprenu kiel ĝi funkcias sed ĉar ĝia historio spegulas la historion de Aŭstralio kaj montras kiom malfacile estis por la pli kaj pli multnombraj enmigrintoj elirigi la landon el la politiko "Blanka Aŭstralio".

17:00 – 17:30 NZEA Jarkunveno

18:00 – 19:30 Vespermanĝo

19:30 – 20:30 Kantoj laŭ ĝenerala kaj lirikverkada vidpunkto (*Kam Lee*)

La prelego temas pri kvar rokmuzikaj kantoj diskutitaj laŭ ĝenerala kaj lirikverkada vidpunkto. Metodoj relate al evoluado de la kanta temo, uzo de rimo, kaj aliaj literaturaj strategioj estos diskutataj al tiuj, kiuj deziras verki lirikojn. Kelkaj personaj anekdotoj estos menciitaj. La kvar prezentataj kantoj estas la sekvantaj kaj ili estas videblaj laŭ la respondaj ligiloj.

1) "Ĉu vi volas danci?" kantita de JoMo. (Originala kanto estas "Do you want to dance?", verkita de Bobby Freeman 1958). <https://www.youtube.com/watch?v=N18hzOTEVfk>

2) "Gefratoj" kantita de Martin Weise. Ludita de Martin Weise kaj la Talpoj. https://www.youtube.com/watch?v=EeXMv_94A_U

3) "La Pluvo" (La lluvia) kantita de Maria Villalon. Verkita de Carlos Matari, Tradukita de Svena Dun, Gitaristo Susi Morla <https://www.youtube.com/watch?v=fOBkKcbJUAE>

4) "Perfekta Iluzio" kantita de Cristina Casella.

Originala kanto "Perfect Illusion" verkita de Lady GaGa (2016), Liriko estas tradukitaj kaj modifitaj de Roberto Pigo. <https://www.youtube.com/watch?v=NJwBJ2gYag0>

20:30 – 22:00 Rakonto-sesio – Venu kaj rakontu bonan rakonton. (Ĉiu ne pli ol 5 min.)

Mardo, 14-a januaro

07:00 – 08:30 Matenmanĝo

09:00 – 17:00 Tuttaga ekskurso

Arataki Vizitejo – Turisma centro kiu provizas informojn pri la ĉirkaŭa natura medio, iomete pri la loka historio, ktp. Ankaŭ havas memoraĵ-butikon.

Kitekite Akvofalo – Bela akvofalo en la arbaro.

Piha – Unu el la plej famaj okcident-marbordaj plaĝoj.

Te Uru – Sartgalerio kiu prezentas nuntempajn artaĵojn. Dum januaro ĝi havos eksposicion pri ceramikaĵoj, inter aliaj.

Kromkosto: \$25.00

18:30 – 19:30 Vespermanĝo

19:30 – 21:30 Seminario pri lingva planado kaj terminologio (*Chris Krageloh*)

Merkredo, 15-a januaro

07:00 – 08:30 Matenmanĝo

09:00 – 10:30 Esperanto-kursoj:

Komencantoj (*Cecily Lee*)

Progresintoj (*Stefan MacGill*)

Spertuloj – Prelegserio de Duncan Charters:

*** Eritreo kaj la rolo de lingvoj en konfliktoj**

Eritreo estas la plej elstara ekzemplo de lando kie lingvaj faktoroj intime ligoas kun religio, kulturo kaj politiko. Gravus ke ni edukiĝu pri tiuj faktoroj, kaj komprenu la rolon de lingva diskriminacio kaj premoj kontraŭ lingvoj en nia hodiaŭa mondo.

10:30 – 11:00 Kafopaŭzo

11:00 – 12:30 Esperanto-kursoj:

Komencantoj (*Cecily Lee*)

Progresintoj (*Stefan MacGill*)

Spertuloj – Prelegserio de Duncan Charters: *** Viaj kontribuoj**

12:20 – 12:40 Kongresa Foto-2

12:30 – 13:30 Tagmanĝo

- 14:00 – 14:45** **Vojaĝado tra la mondo** (*David Ryan*) Prelego kaj fotoj de interesaj lokoj en diversaj landoj
- 14:45 – 15:30** **Rilatoj kun Aŭstraliaj Aborigenoj** (*Helen Palmer*)
Helen pripensas la evoluon de sia rilato kun la Indiĝenoj de Aŭstralio
- 15:30 – 16:00** Kafopaŭzo
- 16:00 – 17:30** **Novaj Religioj en la Socio** (*Mara Molnja & Rouan Van Ryn*)
Kvankam ekzistis delonge multnombraj religioj, dum la lasta jarcento ekaperis dekmiloj da Novaj Religiaj Movadoj, kun aliĝintoj tra la mondo. Kial tio okazis, kaj kion donas tiuj religioj al la socio? Ni esploros kelkajn el la novaj religioj, kaj provos malkovri la respondojn.
- 18:00 – 19:30** Vespermanĝo
- 19:30 – 20:30** **Maoria Vespero**

Jaŭdo, 16-a januaro

- 07:00 – 08:30** Matenmanĝo
- 09:00 – 10:30** **Esperanto-kursoj:**
Komencantoj (*Cecily Lee*)
Progresintoj (*Stefan MacGill*)
Spertuloj – Prelegserio de Duncan Charters:
* **Esperanto kaj humanismo**
Ĉu formo de humanismo ĉiam estis esenca elemento de Esperanto kiel lingvo kaj movado? Surbaze de la evoluo de konceptoj kiel “interna ideo”, “hilelismo” kaj “homaranismo”, ĉu ni povas hodiaŭ koncepti, apogi kaj disvastigi ideologion bazitan sur universalaj etikaj valoroj?
- 10:30 – 11:00** Kafopaŭzo
- 11:00 – 12:30** **Esperanto-kursoj:**
Komencantoj (*Cecily Lee*)
Progresintoj (*Stefan MacGill*)
Spertuloj – Prelegserio de Duncan Charters: * **Viaj kontribuoj**
- 12:30 – 13:30** Tagmanĝo
- 14:00 – 17:00** **Vizito al Aŭklanda Art-galerio** – *Jonathan Cooper* gvidos nin
Kromkosto por ne-novzelandanoj: NZ\$ 20
- 15:30 – 16:00** Kafopaŭzo
- 16:00 – 17:00** **Pestoj, fiherboj kaj... bovoj?! / Nov-Zelando en danĝero**
Estas gravaj problemoj en la medio de Nov-Zelando. Delandaj specoj endanĝeras pro pestoj pluraj, dume la publiko ne konsentas pri la farenadoj. Venu aŭskulti pri specoj delandaj kaj nedelandaj, pri la nunaj solvoj, kaj pri apenaŭ konsiderita minaco, kun iom da vegansima perspektivo.
(Estus pri la diversaj specoj ktp, sed ankaŭ pri la pasinta arbaretuado kiu gravas al tio sed pri kiu homoj ne ofte pensas.
- 18:00 – 19:30** Vespermanĝo
- 19:30 – 22:00** **Teatraĵoj, Aŭkcio**

Vendredo, 17-a januaro

- 07:00 – 08:30** Matenmanĝo
- 09:00 – 10:30** **Esperanto-kursoj:**
Komencantoj (*Cecily Lee*)
Progresintoj (*Stefan MacGill*)
Spertuloj – Prelegserio de Duncan Charters:
* **Latinamerikaj migrantoj kaj la hispana lingvo en Usono**

Kio estas la historio en la fono de nuntempaj disputoj pri hispanlingvaj migrantoj al Usono, kaj kiel statas la uzo kaj lernado de la hispana lingvo en Usono hodiaŭ?

10:30 – 11:00

Kafopaŭzo

11:00 – 12:30

Esperanto-kursoj:

Komencantoj (*Cecily Lee*)

Progresintoj (*Stefan MacGill*)

Spertuloj – Prelegserio de Duncan Charters: * **Viaj kontribuoj**

12:30 – 13:30

Tagmanĝo

14:00 – 15:30

AMO-Seminario I: Oceania movado (*Stefan MacGill*)

Seminario por Aktivula Maturigo (AMO) temas pri trejnado por altigi kapablojn de niaj aktivuloj. Mi pensas ke ebla traduko estas “Leadership Training”. Kadre de AMO 62 mi planas gvidi FLAM-analizon pri la Oceania movado. Bonvolu tralegi la klarigojn pri la principoj de tiuj analizoj en alia parto de la programo. Anglalingvanoj eble jam konas la projekton sub la akronimo SWOT - Strengths, Weaknesses, Opportunities, Threats. Mia solvo en Esperanto estas pli pacama: FLAM - Fortoj, Lamaĵoj, Avantaĝoj, Minacoj.

15:30 – 16:00

Kafopaŭzo

16:00 – 17:00

AMO-Seminario II (*Stefan MacGill*)

18:00 – 19:30

Vespermanĝo

19:30 – 22:00

Sabato, 18-a januaro

07:00 – 08:30

Matenmanĝo

09:00 – 10:30

Esperanto-kursoj:

Komencantoj (*Cecily Lee*)

Progresintoj (*Stefan MacGill*)

Spertuloj – Prelegserio de Duncan Charters:

* **Kien iru UEA? UEA – historio, defioj, nunaj planoj**

10:30 – 11:00

Kafopaŭzo

11:00 – 12:30

Esperanto-kursoj:

Komencantoj (*Cecily Lee*)

Progresintoj (*Stefan MacGill*)

Spertuloj – Prelegserio de Duncan Charters: * **Viaj kontribuoj**

12:30 – 13:30

Tagmanĝo

14:00 – 15:30

AMO-Seminario III (*Stefan MacGill*)

15:30 – 16:00

Kafopaŭzo

16:00 – 17:30

La Bahaa kredo (*Paul Desailly*)

Al averaĝa bahaa estro kiel individua kredanto en Haifa, Chicago kaj New York kio estas la signifo de ‘devas’ en moderna religio? “Dankon al Dio, ke d-ro Zamenhof elpensis la lingvon Esperanto... Per senlaca penado kaj sinoferemo flanke de ĝiaj pioniroj Esperanto fariĝos universala. Tial ĉiu el ni devas studi tiun ĉi lingvon kaj disvastigi ĝin laŭ sia eblo.” Kavaliro Abdul Baha, KBE. (Vd: *FROM BABEL TO BAHA’I* <https://gumroad.com/l/TbtCp> p. 12, 21, 22, 74. Marcel Leereveld, Trevor Steele kaj Vera Payne rekonas la valoron de ‘devas’: <http://aea.esperanto.org.au/ftp-uploads/ESK-128-sep2017.pdf> p.21-24)

18:30 – 19:30

Bankedo, Fotokonkurso

Dimanĉo, 19-a januaro

07:00 – 08:30

Matenmanĝo

09:00

Forveturo: Bonan vojaĝon!